Joseph Freiherr von Eichendorff,

# Vintra nokto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Sub neĝo kuŝas ĉio ĉi,
Ĝojigas min nenio.
Jen arb', sur kampo staras ĝi,
sen iu ajn folio.

Blovadas nur la vento jen,
La arbon skuetante,
Sin movas tiu kvazaŭ en
la sonĝo parolante.

Ĝi sonĝas pri printemp' kaj pri
Verdaĵ' kaj fonto-plaŭdo,
Susuros tiam ree ĝi
Por Di' kaj ties laŭdo.

*Traduko de la Germana poemo "Winternacht" de* JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2003-2-23.*

*Arg-23-46 (2003-11-06 12:25:15)*

*Verkita de Jozefo Barono de Ajĥendorfo (Joseph Freiherr von Eichendorff, 1788 - 1857) (Esperantigita de Manfredo Ratislavo dum la nokto de l' 22a ghis la 23a de Februaro 2003 laŭ la origina germanalingva teksto.)*
*En la germana teksto estas - cetere - iu "neperfekta" rimo. La poeto rimis en la tria strofo la vortojn "Quellenrauschen" (prononcu: kvelenraushen = font-susurado) kun "rauschen" (prononcu: raushen = susuri). Li do kvazaŭ rimis per la sama vorto, do ne estas bona, pura rimo, sed eble pardonebla kiel poeta licenco. En la dua strofo de mia traduko mi permesis al mi rimi per la samsufiksa rimo "skuetante - parolante", do per "abomena adasismo" ;-)*

Joseph Freiherr von Eichendorff,

# Winternacht

Verschneit liegt rings die ganze Welt,
Ich hab' nichts, was mich freuet,
Verlassen steht der Baum im Feld,
Hat längst sein Laub verstreuet.

Der Wind nur geht bei stiller Nacht
Und rüttelt an dem Baume,
Da rührt er seinen Wipfel sacht
Und redet wie im Traume.

Er träumt von künft'ger Frühlingszeit,
Von Grün und Quellenrauschen,
Wo er im neuen Blütenkleid
Zu Gottes Lob wird rauschen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF *(∗1788-03-10 – †1857-11-26).*

*Arg-23-45 (2003-11-06 12:06:19)*